


da, orienta kaj okcidenta bordoj, kiuj havas tre disŝiritan reliefon, kun golfetoj kaj fjordoj, kie estas instalitaj multaj havenoj. 13 % el la teritorio estas kovritaj per glaciejoj (sude kaj sudcentro de la insulo). La Vatnajökull, sola, kun 8.500 km² estas tiom vasta kiom, kune, ĉiuj glaciejoj de la Alpoj !

Islando estas ankaŭ la plej vulkana regiono en Eŭropo. Oni kalkulas, ke dudekon da vulkanoj estis aktivaj de post la enloĝigado de la insulo, kiu tiel suferis pli ol 1.000 erupciojn ! La plej konata el la vulkanoj estas la Hekla (23 erupcioj, la lasta en 1947). Poste okazis la erupcio de la vulkano Askja (en 1961) kaj la submara erupcio kiu en 1965 naskis



**RESTAS NUR KELKAJ LIBERAJ
CAMBROJ POR NIAJ SOMERAJ
PERIODOJ.**

TUJ ALIGU

novan insulon Surtsey, ĉe la suda marbordo, proksime de la Vestmann insularo.

Tiu vulkana aktiveco klarigas la ĉeeston de la 291 varmaj fontoj kaj de la 854 gejoj, el kiuj la akvo elŝpruĝas je temperaturoj de 10 ĝis 100°. Unue uzataj de la kamparanoj por la mastrumaj laboroj kaj eĉ por la trinkigado de la bestaro, tiuj fontoj estas nun orde uzataj por la hejtado de la domoj kaj ankaŭ de la florvarmejoj kie oni kulturas ankaŭ fruktojn kaj legomojn nekutimajn ĉe tiu latitudo (vinberoj, bananoj, tomatoj, ktp).

La klimato estas oceana. Reyjavik havas mezan temperaturon, kiu varias de -2 en januaro ĝis +12 en julio ; oni kalkulas proĵare 1.300 horojn da sunbrilo. Sed se la « Gulf-stream » efikas sur la mezvarma klimato de tiu insulo, la polusaj glacioj sukcesas tamen bloki iujn havenojn ĉe la norda kaj orienta marbordoj. La arbo estas malofta en Islando. La herbo estas mallonga, kaj kreskas ĉefe apud la bordoj kaj en la valoj. La montara herbo, malofta kaj disa, ebligas tamen la bredadon. Safaro estas la ĉefa elemento. La sovaĝa faŭno enhavas ursojn, bovojn, blankajn vulpojn. La bredado de la boaco (importita el Norvegujo) estas protektata de la registaro por malebligi la malaperon de tiu besto. Krutaj rokoj en la Vestmann-insularo estas uzataj kiel rezervejoj por la fraterkuloj kaj la blankaj suloj. Salmoj kaj trutoj estas la ĉefaj riveraj fiŝoj. En la maro, oni fiŝkaptas balenon, segilfiŝon, marhondon, sed precipe moruon kaj haringon (927.000 tunojn en 1964).

La fiŝkaptado okupas la ĉefan parton en la islanda industrio : sekigo, glaciigo, preparado de la fiŝoleo. La bredado ebligas laktejojn, fromaĝfabrikojn. Uzino pri margarino provizas la konsumadon de la tuta lando. La ŝipkonstruado ankaŭ estas tre grava. Ĉiuj fiŝkaptaj islandaj ŝipoj malpli ol 200 toneloj estas enlande konstruitaj. Ni menciigu fine la konstruindustriojn kun iliaj flankindustrioj kaj la gravaj klopodoj entreprenitaj de post kelkaj jaroj sur la kampo de la publikaj laboroj.

Kelkajn vortojn fine pri la loĝantaro. Ĝi estas ĉefe el norda deveno (norvega, sveda, dana) ; sed oni ne devas forgesi la keltan devenon, reprezentitan ĉe la komenco per la sklava klaso. La prilagoado estas la plej malforta el Eŭropo : malpli ol 2 loĝantoj en unu km². 14 loĝlokoj, enhavantaj les 3/5 de la tuta loĝantaro, havas la titolon « urbo » kun ĉiuj rajtoj kaj devoj, kiujn tiu stato entenas.

Jen do Islando, lando de kontrastoj, kie la fajro apudestas glacieron, kaj kie la vilaĝoj ŝajnas pupdometoj sin ŝirmantaj ĉe la piedo de gigantaj montoj.

Jack ROUSSEAU.